BULTENO DE KANADA ESPERANTO - ASOCIO

# ĈU VI SCIAS, KE ..... ?

Volumo 1 Numero 1

marto 2005

## VIA ESTRARO FARAS PLANOJN

Redaktora Resumo de La Prezidanta Raporto

Karaj membroj,

"La Komuna Kongreso de KEA kaj ELNA, kiu okazis en Sidney en 2004, diskutis diversajn proponojn kaj faris kelkajn decidojn."


1/" En ĉiu provinco ni trovu volontulon, kiu kunlaboros aktive por antaŭenigi la celojn de KEA."

2/" La KEA aĉetu adresoliston de iu organizaĵo, ekzemple la asocio 'UN' por komuniki elektronike informon pri 'E'."

3/" Ni reaktivigu la membro-kategorion 'Amikoj de Esperanto' per presitaj kaj elektronikaj eldonaĵoj en la franca kaj la angla lingvoj. Ni trovu redaktoron por la angla novaĵletero! " Ĉu vi?

4/" Ni decidis altigi la membrokotizon al $25.00 jare por ordinaraj membroj."

"Karaj gesamideanoj, ni ŝuldas al vi nun pardonpetojn pro longtempa manko de la apero de la revuo, LUMO. La estraro nun aktive esploras eblecojn por stabiligi la revuon por certigi ĝian aperritmon.



KEA planas rekonstrui nian retejon. Vizitu www.esperanto.ca . Ĉu vi havas proponojn?

Mi finu per la bona novaĵo ke baldaŭ KEA havos novajn informilojn! Mi akceptis la taskon modernigi ilin kaj la laboro bone progresas helpe de kooperа laboro de la estraro." WduT. por

Dr G. Greatrex / Prez. / KEA

**En ĉi-numero**


| | |
|---|---|
| Skoltismo Centjara | 2 |
| Jardeko de Kulturo | 2 |
| Navige tra TTT-paĝoj | 2 |
| Okemo/VEK/NOREK | 3 |
| Estraro | 4 |
| Libroservo | 4 |
| Recenzo | 4 |


**KEA bezonas**

- **unu plian aktivan kunlaboranton en ĉiu provinco kiu ne estas estrarano.**
- **personon tre spertan pri la reto por rekonstrui niajn retpaĝojn.**
- **Donacojn de niaj membroj por kreskigi la Kanadan Esperanto-Fondaĵon.**

## *EL LA ARKIVEJO*

### THE CANADIAN ESPERANTIST 1932—1939

The Canadian Esperantist, la unua Esperanta gazeto en Kanado, aperis kiel unu plena paĝo de la The Northern Tribune, semajna ĵurnalo de Grande Prairie, Alberta de 1932 ĝis 1939. Ekzempleroj de ĝi estas inter la valoraĵoj de la Arkivejo de KEA kiu troviĝas en Sidney B.C.. Mi enmetas fotokopion de unu numero por ke vi povu ĝui legadon de historia legaĵo.

La arkivoj de KEA konsistas el malnovaj gazetoj, libroj, leteroj, poŝtkartoj, protokoloj de estrarkunvenoj kaj malnetaĵoj de ĝis nun neldonitaj tradukoj. Raportoj kaj fotoj de pasintaj kongresoj abundas. Bedaŭrinde, neniu ĝis nun katalogis ilin.

WduT


# CENT JAROJ DE SKOLTISMO EN 2007

En la jaro 2007, skoltismo havos sian centjariĝon, kaj pro tio oni faros jubilean Mondan Ĵamboreon en Britio.

Kutime en tiuj mondaj renkontiĝoj partoprenos pli ol 35,000 gejunuloj el la tuta mondo, kiuj parolas ĉirkaŭ 200 malsamajn lingvojn.

La Skolta Esperanto-Ligo kutime partoprenis tiujn mondajn ĵamboreojn, ek de la komenco de tiuj grandegaj eventoj.

Mi speciale petas al KEA, kaj al Esperantistoj ĝenerale, ke vi okazigu kampanjon inter asocioj de skoltoj en urboj kaj vilaĝoj trans Kanado, proponante la lernadon de Esperanto por akiro de la 'Insigno de Interpretisto'.



Leteroj de amikeco kaj Skolta-Gefrateco

Restas du jaroj por prepari junulojn en Kanado.

Nepre menciu la eblecon lerni Esperanton pere de la reto aŭ per normala letero en la poŝta kurso.

Hector CAMPOS GREZ

Ĝenerala Sekretario de Skolta Esperanto-Ligo

Dum jaroj nia 'honora membro'S-ro U. Paul Ronald gvidis E-kampanjojn inter skoltoj en Kanado.

Nun ni denove bezonas volontulojn por fari simile helpe de la reto kaj per personaj vizitoj al skolt-kluboj!!

## ***Jardeko de kulturo 2000—2010***

Karaj geamikoj,

Vi eble memoras pri la siatempa kampanjo de UEA kolektadi subskribojn por la "Manifesto 2000" de Unesko. Tiam la kampanjo estis tre sukcesa kaj UEA estis inter la unuaj NeRegistaraj Organizaĵoj, kiuj kolektis pli da subskriboj.
Tamen la kolektado de la subskriboj daŭras dum la tuta "Jardeko por Kulturo de Paco," tio estas ĝis la jaro 2010.
Pro tio estas ree malfermita la ebleco rete subskribi la Manifeston 2000 en la paĝaro www.uea.org (sekvu la indikojn: uea interne, agadkampoj, projektoj, manifesto 2000). Estos ankaŭ eble, ĉefe se vi havas lokan grupon aŭ se vi partoprenas landan kunvenon, peti stoketon da paperaj ekzempleroj de la "Manifesto,"por kolekti subskribojn, kiujn vi poste devas sendi al UEA.
Petu tiujn stoketojn ĉe

<uea.unesko@esperanto.org>.

*Renato Corsetti, Via del Castello, 1*
*IT-00036 Palestrina, ItalujoAŭ poŝte ĉe:*
*Universala Esperanto-Asocio, Nieŭwe Binnenweg 176,*
*NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,*

## Navige tra TTT-paĝoj—jen kelkaj sugestoj!

**Edukado:** La paĝaro www.edukado.net lanĉis kampanjon: Per la "jubilee ludo" vi povas lerni pri la paĝaro kaj samtempe gajni libron aŭ KD-on. Informoj troveblas ĉe la sekcio "jubilea konkurso" http://www.hipucomdriacos.com.br.

**Lerni kaj uzi Esperanton** kun amuzo, sen streĉo, oni povas en la retejo de Gyogy Denes: http://www.ludanto.org

**Lernejoj :** En la paĝaro <http://www.edukado.net > troveblas listo de lernejoj, kie Esperanto estas instruata kaj agnoskata kiel oficiala studobjekto. Jen rekta ligo al la listo, kie troviĝas 49 lernejoj el 22 landoj kun entute 1092 lernantoj:

<http://www.edukado.net/es.lernejoj.jsp.>

**Esperantolando:** Ĉe la retpaĝaro <http://www.Esperantoland.org > funkcias pluraj intersaj paĝoj. Ekzemple: Mapoj de Esperanto-grupoj: <http://www.EsperantoLand.org/grupoj> ankaŭ de Kanadaj kluboj. Ĉu la via estas tie?

# OKEMO NE PLU, VIVU ARE!

Nu, estis iom da malgajo en la aero por pluraj partoprenantoj de la 11-a Internacia Semajnfino de Esperanto, ne nur ĉar ni decidis ne plu kunveni en Skiejo Okemo, Ludlow, Vermonto, sed ankaŭ ĉar la nomo Okemo malaperos post 11 jaroj da esperantista uzado. En 2005, la oktobra kunveno por la esperantistoj el Kebekio, Ontario, NovAnglio kaj Novjorkio nomiĝos la Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto, mallonge ARE. Temos tamen pri la 12-a ARE ( kaj ne pri la 1-a ARE. )



La lasta Okemo-kunveno en Vermonto estis sukcesa kun partopreno de 17 personoj el Kanado kaj 31 el Usono.

Se vi volas partopreni en la reta diskutgrupo pri ARE aliĝu al:

Http://groups.yahoo.com/group/autunarenkontiĝo

El "La Riverego."

kebekia esperantista bulteno

Per Normand Fleury

# PROJEKTO DE LA VIKTORIA ESPERANTO-KLUBO ( VEK )

VEK decidis eksperimenti per diversaj manieroj trovi novajn studentojn de Esperanto kaj membrojn por la klubo.

Oni decidis oferti la senpagan poŝtan kurson kiun adaptigis Kim Keeble de la Brita E-Asocio. Unue, ni invitis ĵurnaliston por verki artikolon dum la somera komuna kongreso de KEA kaj ELNA. Tion ni sekvis per reklamoj en semajna unu paĝa gazeto kies nomo estas Coffee News. ( Kaf-Novaĵoj ) Tiu senpaga gazeto estas liverita al ĉiuj kafejoj lunde.

> *Se membro havas projekton por antaŭenigi Esperanton en Kanado prezentu ĝin. Iom da mono haveblas el asocia interezo !*

Tridek-du homoj petis ekzemplerojn de la lecionoj kaj komencis studi ilin aŭ per poŝto aŭ pere de la reto. Unu finstudis la 12 lecionojn en unu monato kaj fariĝis membro. Alia iĝis dumviva membro de KEA,, sed nur manpleno da studentoj daŭre progresas.

La prezidanto de VEK, S-ro Ralph Gonyea, multe dankas al KEA pro subteno de la kluba projekto per subvencio.

# NOREK 2005 NORD-OKCIDENTA REGIONA ESPERANTO-KONFERENCO

La ĉi - jara NOREK okazos en Calgary de la 19a ĝis la 21a de aŭgusto. La kongresa hotelo "Sandman Hotel, Downtown Calgary" ofertas bonegan prezon por kongresanoj 1-800-266-4684 grup-nomo - NOREK konfirmo-numero 227528. Alia ebleco por malmultaj bonŝanaj personoj estos tranokti ĉe Calgary City View B&B. La administrantino Micheline Boisvert lernas esperanton kaj dum NOREK esperas servi al kelkaj klientoj esperantlingve! Micheline baldaŭ revenos de ferio en Kubo (kie ŝi konatiĝis kun lokaj esperantistoj). Oni povos kontakti ŝin ĉe 403-870-5640 www.calgarycityview.com . Pli da informo troviĝos ĉe www.esperanto-antauen.com/NOREK aŭ kontaktu: La Kalgaria Esperanto-centro ĉe 1-403-277-3866 aŭ david.yaki@esperantoantauen.com.

Kanada Esperanto-Asocio
Box 2159, Sidney, B.C.., V8L 3S6

Telefono: 250-656-0502
Fakso: 250-656-0502
Retpoŝto: Esperanto@shaw.ca

***Esperanto :***
***La Lingvo de Paco kaj Amikeco.***
***Ni amas vin!***

## *LA ESTRARO DE KEA*

***Prezidanto :** D-ro Geoffrey Greatrex*

***Vic-prezidanto :** S-ro Normand Fleury*

***Sekretario :** S-ro Ken Price*

***Kasisto :** S-ro Wally du Temple*

***Redaktoro de LUMO :** S-ro Bob Williamson*

***Ĉefdelegito de UEA :** S-ino Olga du Temple*

Mendu viajn librojn:

poŝte : Libroservo de KEA, 6358-A, rue de Bordeau, Montreal, Quebec, Canada, H2G 2R8

Aŭ rete: http://esperanto.ca/kea/libroservo.html

libroj

# MENDU LIBROJN DE NIA LIBROSERVO

**LA AVENTUROJ DE BRAVA SOLDATO ŜVEJK DUM MOND-MILITO**

Aperis la famkonata kontraŭmilita romano de la ĉeha verkisto Jaroslav Hašek spicita per la ilustraĵoj de la konata ĉeĥa pentristo Josef Lada, tradukita de Vladimír Váňa. La romano estas parte aŭtobiografio de la aŭtoro mem – la aventuroj de la soldato Ŝvejk plurloke similas al tiuj de Hašek. Iom koncize dirite, temas pri la travivaĵoj de la simpla absolute malmilitema homo, kiu estis perforte eltirita el la paca vivo kaj ĵetita en la teruran unuan mondmiliton. Nia heroo kolizias mulfoje, en la milita armea medio, kun la misformitaj karakteroj de divers-rangaj potenculoj, kaj armeaj kaj civilaj, li kolizias ankaŭ kun la absurdeco de la kruela milita medio. Tamen nia brava soldato solvas ĉiujn problemojn, kiuj trafas lin, kun humuro kaj ofte eĉ kun akra ironio, ŝajnigante sin iom stulta. Lia sinteno en similaj situacioj fakte prezentas en la ĉeĥa literaturo, kaj eĉ ekster ĝi, la fenomenon „Ŝvejk".

La verko estis tradukita en vicon da lingvoj. En Esperanto jam antaŭ jaroj aperis fragmentoj eldonitaj de SAT kaj de KAVA-PECH. Nun eniras Esperantujon la kompleta traduko de la fama romano, envicigita en la serion „Oriento-Okcidento" kiel ties 38-a numero, kun la antaŭparolo de Renato Corsetti. C$ 64.00